

1971

numero 2

# JEN BULTENO

kvaronjara esprimilo de la

Junularo Esperantista de Nordameriko

## GRAVAJ DUMSOMERAJ PROGRAMOJ

Tiuj kiuj havas iom da libertempo devus konsideri la enlandajn kaj eksterlandajn Esperanto-okazontaĵojn kiujn ili povos ĝui ĉi-somere.

Eksterlanda rondvojaĝo por la studo de Esperanto okazos inter la 31-a de Julio kaj la 28-a de Aŭgusto. Oni vizitos Londonon, Edinburgon, kaj la Chateau Grésillon en Baugé, Francujo. Oni partoprenos la Universalan Kongreson, la TEJO-Kongreson, la Someran Universitaton, kaj la kulturajn programojn de la Chateau.

Personoj kiuj partoprenos la kurson ricevos kvar studkreditojn por la fako "Humanities" de San Francisco State College.

Ankaŭ ĉe SFSC, por ni kiuj devas resti en Usono, estas triopo da kursoj sub la estreco de William Auld el Skotlando. Okazos kursoj je la baza, meza, kaj altgrada niveloj, dum tri semajnoj kaj po tri studkreditoj por ĉiu kurso.

Ĉu tiuj ĉi libertempoplanoj allogas vin? Se jes, kontaktu Esperanto Information Center, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010 por peti pli da informo.

## SEMINARIO PRI "LINGVO KAJ KULTURO"

En Strasbourg, Francujo de la 5-a ĝis la 12-a de septembro okazos tre interesa seminario pri la temo de la rilatoj inter lingvo(j) kaj kulturo(j) je tri vidpunktoj: lingvistika, sociologia, kaj ideologia. Ĉiuj internaciaj junularaj organizoj kaj interesiĝintaj personoj rajtas partopreni. (La tri lingvoj oficiale uzataj estos la franca, la angla, kaj Esperanto.) Post kelkaj enkondukaj prelegoj sekvos diskutado per grupoj kiuj establiĝos laŭ lingvo aŭ celo. Fine, ĉiuj kunmetos konkludojn por estonta eldonaĵo. Tiuj kiuj bezonas pluajn informojn skribu al TEJO, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z, NEDERLANDO.

Mi dume estas parolinta al kelkaj anoj de JEN kiuj interesiĝas pri tiu temo, kaj donas iliajn nomojn kaj adresojn por ke iu alia kun sama intereso povu korespondi tiurilate. Fine mi rekomendos Jon Pool kiu havas bonegan bibliografion kaj kiu do povas citi la necesajn librojn por respondi al viaj diversaj demandoj kaj problemoj.

Michael Larkin, North Area, Bldg. 406, Box 307, Fort Myer, VA 22211
Eugene Marangoni, 19305 Falmouth Court, Saratoga, CA 95070
Gary Mickle, 1519 Lemon Lane, Davis, CA 95616
Jonathon Pool, Dept. of Pol. Sci., SUNY at Stony Brook, Stony Brook, NY 11790

Se vi havas aliajn specialajn interesojn, mi sugestas ke vi publikigu ilin en la JEN-Bulteno--eble vi trovos ke aliaj JEN-anoj havas tiujn samajn interesojn.

Bonŝancon! -- Tom Goodman

## RENKONTIĜO EN OHIO

"Nia tutŝatkunveno estos la 27-a de junio en Cincinnati. -- La Esperanto-klubo de Ohio -- Luĉjo Cook"
adreso: Lewis Cook, Jr., P.O.Box 422, Circleville, Ohio 43113

Raportu al JEN-Bulteno pri interesaj Esperanto-aranĝoj ĉe vi!

* * * * *

OKCIDENTA KONFERENCO de Erik Felker

La Okcidenta Konferenco pri filiteraturo kaj Esperanto okazis je la 2-a, 3-a, kaj 4-a de Aprilo en San Diego, California. Estris Francis E. Helmuth, Prezidanto de ELNA. Ges-roj Helmuth ankaŭ gastigis la partoprenantojn por ĉedoma festo.

Kvankam la Konferenco ne tre serioze pritraktis la diskuttemon. Oni diskutis, ekzemple, la kontraston inter la sufikso "aĉ," kiu esprimas la ideon de netaŭgeco aŭ mallerteco, kaj la prefikso "fi," kies koncepto estas morala. Do, kio estas fia por unu persono eble ne estas por alia. Ĉu "milito" aŭ "pafilo" ne estas fivortoj laŭ la juĝo de kelkaj? Dum la ĝenerala diskuto de la temo ni akiris pli larĝan komprenon de la naturo(j) de fieco, ĉu rilate al seksaj temoj aŭ al aliaj. Ne estas simpla afero, escepte por tiuj, kiuj ne volas pensi!

Ĉu vi iam serĉas kvazaŭblasfemajn vortojn? Kelkaj indaj sugestoj ofertiĝis dum la Konferenco. Inter ili: ŝaktabulo! Kristoforo Kolombo! blunderbuzo! kaj Fundamenta Krestomatio! Do vi ja estas preparata se vi frapos vian dikfingron dum martelado.

Ankaŭ la slango de Esperanto riĉiĝis per nova aro de Esperanto-bestoj. Vi jam konas la krokodilon: tiu kiu parolas la denaskan nacian lingvon en Esperantujo. Elektante bestojn el ĉiuj aliaj kontinentoj, el la maro, kaj el la homa imagpovo, Timothy Fallis, Margaret Barkley, David Jordan, Doris Vallon, kaj tiu ĉi raportanto prezentas la jenan bestaron:

Afriko: krokodili- jam konata.

Azio: pandi- ne aktive uzi E-on. (Ĉar la vivo de la pando estas tre izolita.)

Eŭropo: kukoli- krei proprajn neologismojn. (Ĉar la kukolo, anstataŭ prizorgi siajn idojn, faras laboron por aliaj birdoj; simile, la E-kukolo, anstataŭ prizorgi sian vorttrezoron, malsimpligas la komprenon por aliaj.

Aŭstralujo: vombati- paroli en E-ujo lingvon kiu estas nek E-o nek la denaska nacia lingvo. (Ne ekzistas klarigo por tiu ĉi besto; nur la ĉarma sono de ĝia nomo!)

Sudameriko: papagi- trompiĝi de "falsamikaj" vortoj. (Ĉar la papago ofte miksas kaj misuzas siajn frazetojn.)

Nordameriko: didelfi- silenti kiam oni devus praktiki. (Klarigo nenecesa!)

Antarktiko: pingveni- ne voli fari necesajn kompromisojn aŭ kunlaboron kun ne-Esperantaj instancoj por pliutiligi la lingvon en ĉiutaga vivo. (Ĉar la pingveno estas nur nigra kaj blanka, kiel ĉiu demando laŭ la Esperantaj pingvenoj.)

Marbesto: polpi- uzi mangestojn anstataŭ ol Esperanto-vortoj.

Internacia besto: koki- eterne komenci. (Ĉar la eterna komencanto scias saluti, kiel la koko scias saluti la sunon, sed nenion plu scias diri.)

Imaga besto: unikornuli- vortludi aŭ kalemburi (Ĉar la ŝercoj estas unikaj.)

Ĉu vi deziras aldoni beston al nia bestaro? Se jes, bonvolu skribi al la redaktoro.

Gravaj aferoj pritraktitaj dum la aferkunsidoj estis planoj pri Portlando kaj la bezono por pli da delegitoj en Usono. Oni sugestis ke personoj kiuj loĝas en urbetoj kiuj estas apud grandaj urboj listigu sin kiel delegitojn en sia urbeto kaj kiel fakdelegitojn en la granda urbo. Ĉu vi deziras partopreni la tutmondan delegit-reton?

Se jes, nepre konsultu vian Jarlibron aŭ, se vi ne estas ano de UEA, skribu al la ĉefdelegito por Usono, S-ro Armin Doneis, Box 105, Pharr, Texas 78577.

Fine, mi povas diri ke kiel turisto en San Diego mi vidis la bezonon de internacia lingvo; en la fama bestĝardeno, en la antropologia muzeo, kaj en la flughaveno mi vidis anoncojn dulingvajn (angle kaj hispane), sed nur la mallongaj anoncoj tradukiĝis hispanen.

Resume: bona miksaĵo de laboro kaj amuzo. Vi kiuj estas okcidentŝtatanoj, kial ne ĉeesti la venontan?

NEKROLOGIO

Jena malfeliĉa informo ĉerpiĝas el neesperantista fonto, novaĵbulteno de scienc-fikciaj amatoroj Locus:

"La fina informo pri la murdo de EDWIN BAKER, 30-jara Los-Anĝelesa /s-f/-amatoro, estas ke li ŝajne akceptis petveturanton postnoktomeze, kiu kelkajn domblokojn de sia hejmo mortige pafis lin dufoje por kiu ajn malgranda kvanto da mono troviĝanta en lia monujo. Treege populara amatoro, Ed estis serioza laboranto en du tendaroj--li estis la bibliotekisto de LASFS kaj ankaŭ la plej juna direktoro de la loka Esperanto-klubo. (Forry Ackerman)"

* * * * * * *

ĈU RELIGIO NUN ION AJN SIGNIFAS?

Doug Montgomery

Se vi estas kiel la plimulto de homoj, iam vi estas trovinta Biblion en librejo aŭ en hotelo, nur por eklegi ĝin. Ĉiam vi decidas ne ĝin tute legi, pro unu aŭ pli el tiuj ĉi kialoj:

1) La lingvo estas eksterepoka kaj ne ne facile komprenebla;

2) Vi iom konas la ekleziojn de Katolikeco, Luteraneco, Presbitereco, ktp.--pri iliaj kontraŭdiraj doktrinoj, pri ilia beno de militoj kaj partoprenemo en politiko ktp; kaj se ili reprezentas la Biblion kaj Dion kaj Jesuon Kriston, kial oni tiujn kredu?

Nu, se vi komparas religion kun la Biblio, vi miras. La Biblio predikas amon, esperon, fidon--sed ne la Kristaneco.

3) Vi eble estas aŭ leginta aŭ aŭdinta, ke "scienco" montras la Biblion esti falsa.

Pro tiuj tri kialoj, oni al si demandas: Se tiuj religioj reprezentas Dion, kaj ili estas tial sensencaj, do nek religio nek Dio gravas al mi; do, ne ekzistas Dio.

Ho, kia misreprezentado! Pro la fuŝemo de la Katolikaj, Protestantaj ktp., multaj homoj ekmalamas Dion kaj Jesuon. Homo sagaca ĝuste deduktas, ke tiuj ĉi religioj estas mensogantaj jam de longa tempo kaj volonte rifuzas mediti pri la Biblio. Eĉ Baptista predikisto Billy Graham, bonekonata parolanto de Dio kaj Jesuo, diras: "Mi deziras, ke mi ekscias pli pri la Biblio." Ĉu predikisto ne devas almenaŭ tralegi la TUTAN Biblion unufoje? Kaj S-ro Graham jesas, ke li ne sufiĉe scias! Jes, vi ne esperu, lerni pri Dio kaj Jesuo per tiaj predikistoj.

Pri scienco: la teorio de Darwin pri la evoluiĝo de homo estas ne nur sensenca, sed kontraŭscienca, ĉar la leĝoj de genroj montras ke biologia speco ne povas ŝanĝi en alian specon. Tion ĉi la Biblio ankaŭ diris, pli ol tri mil (3,000) jaroj antaŭ hodiaŭ. (Komenco ("Genezo") 1:11, 12, 21, 24, 25.) Do leono ne povas fariĝi ĉevalo, kaj ŝarko ne povas fariĝi baleno, kaj, tial, simio ne povas fariĝi

homo. La Biblio konsentas kun VERA scienco, ne kun la divenaj TEORIOJ. Jen, Ijobo 26:7: "...Li pendigas la teron sur nenio." Tion la Biblio diris, pli ol tri mil jaroj antaŭ ol la astronaŭtoj en spaco vidis la teron de en la Apollo VIII spacoŝipo!

La lingvo de la Biblio konfuzas multajn nun; precipe en Biblioj en la angla lingvo, kiuj uzas la lingvon de la dek-sepa jarcento. Sed la skribintoj de la Biblio tute ne tion faris. La hebrelingva parto estis en moderna hebrea tiam; ili ne havis antikvan hebrean. La tielnomata "Nova Testamento" estis skribita en koiné greka de la unua jarcento, kiam Jesuo estis sur la tero, ne en la klasika greka de Sokrato kaj Sofokleso. Do moderna Biblio estu en moderna lingvo. (Estas pri tio tre bona, ke D-ro Zamenhof kaj aliaj tradukis la Biblion en Esperanton ankaŭ.) La Reĝo Jakobo (King James) traduko de la Biblio en la angla lingvo estas tre populara en Britujo kaj Usono, malgraŭ ĝia antikva lingvo. Notu kiel la lingvo ŝanĝiĝas, tra kvar tradukoj de Mateo 11:12 (Laŭ la Sankta Biblio en Esperanto, "Kaj de post la tagoj de Johano la Baptisto, ĝis nun, la regno de la ĉielo estas perfortata, kaj perfortuloj kaptas ĝin," sed ĝusta traduko montras "fervore celata" anstataŭ "perfortata" kaj "Tiuj fervoraj celuloj" anstataŭ "perfortuloj:")

> "And fro the daies of Joon Baptist til now the kyngdom of heuenes suffrith violence, and violent men rauyschen it."
>
> --Wycliffe-Purvey, ĉ. 1388.
>
> "From the tyme of Jhon baptist hitherto the kyngdom of heven suffreth violence and they that make violence pull it vnto them."
>
> --Tyndale, 1526.
>
> "And from the days of John the Baptist until now the kingdom of heaven suffreth violence, and the violent take it by force."
>
> --Reĝo Jakobo, 1611.
>
> "But from the days of John the Baptist until now the kingdom of the heavens is the goal toward which men press, and those pressing forward are seizing it."
>
> --Novmonda Traduko de la Sanktaj Skriboj, 1961.

Trans ses cent jaroj tiu lingvo ŝanĝiĝas; tial, do, ni ne havu Biblion en modernaj lingvoj? Iu ekinteresiĝas pri legi la Biblion sed ne povas sufiĉe kompreni multon; li ekkredas, ke la Biblio, kiel ĝia lingvo en multaj tradukoj, ĝuste apartenas al antikva tempo, kaj pro evoluiĝo nun ni multe pli scias ol la skribintoj de la Biblio.

Tio estas malfeliĉaĵo. La Vorto de Dio ne estu kaŝita de homoj. Se ĉiu povus kompreni la Skribojn en sia lingvo, havus tradukon kompreneblan, li povas konfidi al Dio. Homoj kredas ke religio estas tute kiel la lingvo en kiu ili ĝin konas skribite; antikva, historia, ne valora nun.

Sed, ho, kian staton ni konas, pro tia kredo! Ni timas ŝajne ĉion. Nacioj timas aliajn naciojn. Oni timas timon. En multaj urboj ĉie en la tero, estas danĝere, piediri post la sunsubiro. Oni perfidas alian eĉ en komerco, en politiko, en leĝo. Kion la Biblio diras pro tio? La apostolo Paŭlo diras al ni:

> "Redonu al neniu malbonon pro malbono. Se estos eble, restu pacaj viaparte kun ĉiuj homoj. Ne venĝu vin, amataj, sed cedu lokon al kolero; ĉar estas skribite: 'Ĉe mi estas venĝo; Mi repagos,' diras Jehovaĥ [Dio]. Sed se via mal-

amiko malsatas, donu al li manĝi; se li soifas, donu al li trinki; ĉar tion farante, fajrajn karbojn vi kolektos sur lia kapo. Ne venkiĝu de malbono, sed venku malbonon per bono." -- Romanoj 12:17-21

Sed oni eble diros, "Nu, tio estas nur idealaĵo. Se ĉiu pozus tiel, kian sendanĝeron ni konus?" Mi diras, nu, kio estas la rezultoj dum miloj da jaroj, ĉe la plimulto pozante MALE? Militoj, malsano, malsato, malriĉo, malamo, miskompreno, timado ktp. Jes, se la Biblio estas la vera Vorto de Dio, oni postulu, ke estas ĝi la plej praktika libro, kiu ekzistas. Mi diras, Se vi pozos laŭ la Biblio, TUTE laŭ la Biblio, vi ekeltrovus, ke multaj problemoj malaperos. TIO estas la koro de la Vorto:

"...'kiu ordono estas la unua?' Jesuo respondis, 'La unua estas, "Aŭskultu, Ho Izraelo, Jehovaĥ nia Dio estas unu Jehovaĥ. Kaj vi devas ami Jehovaĥon vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj per via tuta forto." La dua estas, "Vi devas ami vian alproksimulon same kiel vin." Ne ekzistas alia ordono pli granda ol tiuj du.'" (Marko 12:28-31)

Dio, tamen, ne nin lasis sen religio, kiu instruas kaj predikas ĝuste laŭ la Biblio. Ĉu iam vi estas aŭdinta pri la kristanaj atestantoj de Jehovaĥ? (Jesajo 43:10-12) Tiuj ĉi ĝoje respondas al viaj demandoj pri religio, Dio kaj la Biblio. Tion ni ja devas, precipe en tiu ĉi tempo de problemegoj.

: : : : : : : : : : : : : : : :

## LETERO(J)

"La BULTENO bone alvenis. Dankon. Ĝin mi enmetos kun aliaj gazetoj, kiujn mi cirkuligas en rondeto de tiuj, kiuj esprimis sian deziron, ilin prunte havi. Espereble, ke la BULTENO akiros iom pli da abonantoj tiel.

Mi firme kaj tute subtenas vian ideon /vidu Ĉu Internacia Monsistemo? de Tim Fallis en n-ro 1, 1971./ pri la universaliĝo de la "Stelo" (de UL)! Mi ĉiam uzas tiun valoron por kiel eble plej multaj mendoj kaj aĉetoj.

Bedaŭrinde, ke UEA kutime ekuzas tiun monunuon de la lando, en kiu estas ĝia Centra Oficejo: svisa franko; angla ŝilingvo; nun la guldeno nederlanda. Iuj aliaj organizoj kaj gazetoj uzas diversajn unuojn; kelkaj uzas la usonan dolaron.

Ni ĉiuj devus uzi nur la "Stelo"n! Mi tajpis liston de la valuto de la "Stelo" kompare al la usondolaro, ĝis 50 Steloj, kaj tiun liston mi havas surmure por rapida ekutiligo. (1 stelo=$,075 (=7½¢); US$1,05=14 steloj)

Tamen, se la tuta mondo (almenaŭ esperantista!) uzus nur la "Stelo"n, oni povus pensi sen la neceso ŝanĝi prezojn, kotizojn en aliajn monunuojn.

Tamen, vi devas memori, ke multaj personoj vivgajnas per la ĥaosa stato de diversaj monsistemoj de la mondo (Same kiel tiuj, kiuj kontraŭas starigon de unu unuforma universala lingvo: tiuj personoj nun vivas per la nuna lingvo-ĥaoso!)

amikan saluton -- Conrad Fisher

NI INVITAS VIAN OPINION. ANKAŬ VI LETERU AL LA BULTENO!

Por tre grava Esperanto-ekspozicio en la ĉef-poŝtoficejo de Rio de Ĵanejro, la 6-a Seminario de Esperanto petas vian afablan helpon. Bonvolu sendi al ili por montrado la 22-an ĝis la 25-an de Julio du poŝtkartojn de via urbo, aŭ, se tio ne eblas, du ordinarajn fotografaĵojn prezentantajn la saman pejzaĝon. Sur iliaj dorsaj flankoj aŭ en aparta letero, bonvolu priskribi la bildon per klaraj, facile kompreneblaj frazoj en Esperanto. Se vi povos, figuru per la Esperanta alfabeto la prononcon de propraj nomoj okaze uzitaj.

Sendu la materialon kiel eble plej baldaŭ al:

Vivaldo Marcelino da Silva
Banco do Brasil -- Campos (RJ)
BRAZILO

Okazas pli granda simpatio pri Esperanto flanke de la brazila registaro. Helpu la brazilajn samideanojn per tiu ĉi simpla kunlaboro!

DEZIRAS KORESPONDI

dez. interŝ. kolorajn bildkartojn "kaj interkorespondi je kosmaj temoj" F-ino Antonio Kostova (23-j.), Antim I-4, Plovdiv, BULGARIO

S-ino D. Jordomeva /??/ (33-j.), Volov 32, Bjala, Rusenko, BULGARIO

32-j. muzikinstruistino/ interesoj: "muziko, teatro, literaturo, lingvoj, turismo kaj multaj aliaj." Ĝis nun--neniu usona plumamik(in)o. F-ino Maria Mrázová, Tylova 78, Plzeň, ĈEĤOSLOVAKIO

31-j.--bazaj profesioj-pentristino, filmaktorino kaj ĵurnalistino (poetino)--dez. kor. kun esperantistoj de ĉ. aĝo kaj ĉ.l. kaj temoj a. de /tiele/ artaferoj--serĉas seriozajn geamikojn en t.m. -- 1) literaturo, poezio; 2) ĵurnalismaj aferoj; 3) pentrarto, skulptarto, grafiko; 4) lingvistiko kaj filozofio; 5) filmarto (interpretado, reĝio k.t.p.); 6) muziko (klasika kaj moderna) -- interŝ. de b.k. kaj p.m. -- flue konas francan, anglan kaj germanan lingvojn -- S-ino (D-ino) Florentyna-Renatte-Lorelay Dudescu, Poŝtrestanta, urbo: Covasna, jud: Covasna, RUMANIO

S-ro Jurij Kriuljov, 603105-Gorjkij,-D105, Opernaja 29-57, SOVETUNIO

S-ro Ernest Black, RD 1, Box 230-A, Saugerties, New York 12477, USONO, dez. kor. kun ĉ.l. pri literaturo, muziko, sportoj, fotografio, filatelo, k.t.p. /bv. represi/

informoj provizitaj de JEN-Koresponda Servo, ĉe Ellen A. Lewis, 15 Salisbury Road, Brookline, Mass. 02146

: : : : : : : : : : : : : : : : :

"Skribado" el "Pli Malproksimen ol la Civilizado" de Paul Bohannan, instruisto de antropologio ĉe Northwestern University. Traduko de parto de artikolo el Natural History (Februaro, 1971) Kopirajto: American Museum of Natural History.

Skribado (escepte de kelkaj memor-helpiloj kiel la noditaj ŝnuretoj kiuj nomiĝis "kipu" en la keĉua lingvo de la Inkaa civilizacio) estas la unua ilo krom homaj mensoj kaj homaj interrilatoj por "konservi" kulturon. Skribado malfermis tute novan eraon ĉar (uzante la ĵargonon de la komputila epoko) la problemo de konservo kaj retrovo de scio solviĝis laŭ nova maniero. Skribado solvas la konservo-problemon pli bone ol la retrovo-problemo. Tamen, skribado ebligas la konservon de grandaj kvantoj da kulturo dum longaj tempoperiodoj sendepende de

la konstanta ripeto bezonata por konservi ĝin en la menso. Oni povas skribi ion kaj meti ĝin en iu loko, kaj eble iu trovos ĝin iam. Tiu fakto--ke ne ĉio el la kulturo kiu disponeblas al iu socio bezonas resti ĉiam en la menso--rezultas je la amasigo de vastaj kvantoj da kulturo kaj permesas la kulturajn malsimilaĵojn kiujn postulas la malsimpleco de civilizacio.

Leg- kaj skrib-kapablo ankaŭ afekcias personecon. En antaŭ-malanalfabetecaj socioj la solaj homoj kiuj povas famiĝi kaj senmortiĝi estas tiuj kiuj agas: herooj ĉe la malfono de agado. Malanalfabeteco pretigas la fundamenton por romantiko--eblas ke iam oni malkovriĝos, spite de la malestimo de la samtempuloj. Penso ekhavas novan signifon se iel ĝi povas dummomente senkorpiĝi el la pensanto. Nova ideamplekso konstatiĝas, kiu eble eĉ pretigas la fundamenton por tiu plej monstra el filozofiaj disigoj--la disigo de menso kaj korpo.


Skribado ankaŭ ebligas novan nivelon de scienca atingo--ankoraŭfoje ĉar ne estas bezonata ke unu persono sciu ĉion, aŭ ke malsimpla socia grupo organizu kaj transdonu parole la scion--tipo de organizo trovata en frua religio kaj en scienco, precipe en astronomio. Mallonge dirite, scio liberiĝis de la homa menso kaj de la socia strukturo tiel ke ambaŭ povus postuli ĝin laŭbezone. Tiel, troviĝis novaj ampleksoj de scienco, same kiel de komerco kaj literaturo.

--elangligis Erik J. Felker

* * * * * * *

La 3-a ĉi-jara numero, kiu esperible aperos post nelonge, estos la lasta, kiu eldoniĝos ĉe la nuna adreso. Postaj numeroj eldoniĝos ĉe Erik Felker, 731 Birmingham Road, Burbank, CA 91504. Bonvolu sendi kontribuojn (krom tiujn kun tre aktuala karaktero) al tiu adreso. -- G.M.

Redakcio, <u>JEN-Bulteno</u>
ĉe Gary Mickle
1519 Lemon Lane
Davis, CA 95616
U. S. A.




<u>FIRST CLASS</u>

[redacted]

<u>ADDRESS CORRECTION REQUESTED</u>